# HEJS


JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

**Nro. 82 - 1973**



Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 29 - BILBAO-5

## LA PREZIDANTO INFORMAS

# EN HAVO

Enhavo........................1
Notoj........................1
Agresemaj birdoj.........2
Picasso ..................3-4-5
La Prezidanto informas...6-7
Humora angulo ...........8
La virino ktp. ..........9-10
Koresponda Servo ........11-12

# NOTOJ

1) .- Kiam vi devas sendi poŝtmandaton al ni, bonvolu, ĉiam adresi ilin je la nomo de HEJS , kaj ne de iu estrarano, ĉar se li (ŝi) ne povas viziti la poŝtoficejon oni ha vas komplikaĵojn por ke iu alia povu enspezi la monsumon.

2) .- Ĉar je la 23ª de Junio certe ni ne estos atingintaj la kvantom da 100 novaj membroj, kun bedaŭro ni devas informi al vi ke la anoncita lotado ne okazos. Ni estis tro optimistaj pensante pri la interesiĝo de junaj /"esperantitoj"/ rilate al HEJS-movado. Kaj pri, la literatura konkurso ankaŭ ni bedaŭras la nulan alvenon de konkursaĵoj ĝis nun, kvankam ankoraŭ restas al ni eta optimismo. Se vi sendos kontribuaĵon bonvolu, rimarkigi sur la koverto "por konkursi".

LA ESTRARO



# LA agresemaj birdoj



Antaŭ kelkaj monatoj, mi vidis birdon ĉe mia fenestro. Ĝi kantis kaj saltis inter la floroj, kaj tiu spektaklo gajigis min. Do, mi pensis ke estus bona vidi tion pli foje, kaj mi lasis panmolaĵojn tie.


Mi estis pacienca, kaj, finfine mi vidis manĝita kien mi lasis. Ek de tiam, la birdoj venas ĉiutage.

**Sed mi rigardas ke kiam unu el** ili estas manĝante, forpelas al ĉiuj kiuj deziras manĝi, malgraŭ ke estas sufiĉe da pano por ili ĉiuj. Ĉi-tio pensigas min. Ekzistas multaj homoj kiuj ju pli havas, des pli deziras havi .

Tiaj homoj estas ĉiam pensante kion ili povas ŝteli de la aliaj, kiel ili povas pligrandigi kion ili havas, kvankam ili bezonas nenion plu.

Same okazas al la landoj; potencaj landoj subpremas la malriĉajn, kaj ŝtelas iliajn naturajn riĉaĵojn.

Nia terglobo havas sufiĉan lokon por ni ĉiuj; kial,do, forpeli al la aliaj?. Kial, do, militoj, kruelaĵoj, ktp ?. Laŭ mia penso, multaj homoj estas kvazaŭ agresemaj birdegoj.



ASIER

# PICASSO! omaĝo kaj rememoro

La 8an. de aprilo 1973ª, en Notre Dame de Vie en Mougins mortis Pablo Ruiz Picasso, la plej granda artisto el la tuta Historio.

Forpasis la simbolo-viro el la XXª jarcento, la pentristo de la libereco, tiu kiu sciis fari sin pli respondeca en sia kondiĉo de libera homo. Homo de sendependa vivo, kiu trudis sian kriterion, kreante amikecon samtempe postulante la rajton fumi sian pipon ( laŭ li diris al Daghiler kiam oni sugestis al li pentri dekoracion por baledo), kiel esprima metaforo de la rajto daŭrigi en sia tuta persona kriterio.

"Ne priokupas min" - Picasso skribis - la pozitivan juĝon de la estontaj generacioj, kio interesas min estas ke mi povu nun esti libera, translokigi la manifestacioj de mia penso al grado de lumo kiu dignigos la estantecon kaj la vivon esti vivataj.

Li ĉiam vivis en daŭra revolucio kontraŭ si mem, kaj kun la ebleco ke liaj formoj fariĝu senmoraj. Pro tio li daŭre portis sian kreadon al la natura tereno de la kontraŭstaro, kaj ne al la facila de la solvo por eviti stagni sian kreadon en tiu rajto kiun li mem per sia tuta antaŭa agado jam estis atingita.

Fine de siaj Roza kaj Blua epokoj, atingita la publikan rekonon kaj permeson por sia arto, li ne haltas, ne apogas sian postan kreadon en tiu kolono. En daŭra lukto kontraŭ tio stablita, li komencas novan esploran epokon. Jaroj de senlaca batalo, de planado kaj sintezo. Jaroj kiam li uzante la kuraĝan decidon de sia libereco, kreadas akran pentrmanieron kiun oni nomigas " Kubismo ".

Fine, atariginta la kubismon kiel akiritan rajton, li forlasas ĝin kaj komencigas epokon de klasikista Rekuperacio; poste venus la Subrealista, poste la Esprimista kaj dum la lastaj 40 jaroj, sintezigas plej genimaniere, kiujn siajn antaŭan malkovrojn.

"Mia tuta artista vivo -diris Picasso- ne estis alia ol lukto kontraŭ la reakcio kaj morto de l'arto. Laŭ mia opinio -diris- serĉi signifas nenion. Kio grava estas trovi. Tiu kiu atingas trovi ion ajn scias eksciti almenaŭ nian scivolemon, se ne nian admiron ".

Nur li ne celis la abstraktan arton, tial ke por li, la problemo ne estis de abstrakteco, sed de realeco. "Kiam mi pentras mia celo estas montri tion kion mi estas trovinta, kaj ne kion mi estas serĉante. Ni ĉiuj scias ke l'arto ne estas veraĵo. Naturo kaj arto malgraŭ esti du malsamaj aĵoj, ne povas reprezenti saman aĵon. Per l'arto ni esprimas nian koncepton pri tio kio ne estas naturo. L'arto ĉiam estis arto, kaj ne naturo.

Ĉio koin li pentris trapasis lian propran vivon. Tie radikas la forto de lia pentrarto, kie ĉio estis vivo, kaj propra karno.

Liaj pentraĵoj havis kelkfoje la postsignon de liaj bedaŭroj kaj tre ofte la ludan postsignon de lia ludado. "Mi ne serĉas, mi trovas. Mi bezonis mian tutan vivon por lerni desegni kiel la infanoj" .

Ĉar Picasso, faris el sia ludo krean elementon, li sciis ludigi sian laboron. Homo en la plej radika la senco de tiu vorto, li nenian konceptis la mondon sen la virino. Li neniam povis vivi sen ŝia proksimeco. La virino nobligis ĉiam lian spiriton kaj kreadon.

Lia obsedo estis prezenti nekonatajn aspektojn de la realeco, vidigi tion nevideblan de la aliuloj kaj tiumaniere, realigi politikan aŭ socian laboron.

"Mi deziras ĉimomente memorigi al vi ke ĉiam mi kredis, kaj ankoraŭ kredas ke la artistoj kiuj vivas kaj laboras kun moralaj valoroj, ne povas resti indiferentaj antaŭ konflikto kie estas diskutataj, la plej altaj valoroj de la homaro kaj la civilizacio".

Li ĉiam kondamnis kion li malamis: militon, starigis kion li amis: homon, virinon, animalon, teron kaj maron .

Lia pentrarto estas ammaniero al la vivo kaj eĉ Guernica, verko kie la morto estas rimarkindaĵo, estas precipe kanto al la vivo.

Resumi Picasso'n je la horo de lia morto estas neebla.

Foriris por ĉiam genia hispano.

Estu ĉitiuj linioj omaĝo al lia honorbildo.

ENRIQUE FUEYO



# LA PREZIDANTO INFORMAS

Dum la XXª Hispana Kongreso de Esperanto en Málaga okazanta dum la jaro 1959ª, aro da gejunuloj fondis novan sekcion de HEF. Estis la katalunaj la unuaj gvidantoj kiuj dum dek jaroj sukcesis organizi plurajn esperantajn agadojn inkluzive Internacian Kongreson de TEJO, konstruis restadejon, eldonis bulltenon k.t.p. .

Post la XXXª Hispana Kongreso en Mieres 1970 la sidejo de HEJS translokiĝis al Bilbao kie oni daŭrigas la agadon de niaj pioniroj. La organizo HEJS ne estas sufiĉe konata de nia junularo. Pro tio , ĝia prezidanto José Fariñas respondas pli sube niajn demandojn. Nuntempe la plej efika ligilo por ni ĉiuj estas la "Bulteno" kiu aperas regule, kaj pri kies plibonigo klopodas ĝia estraro, malgraŭ la financaj malfacilaĵoj. Ĝi eĉ meritis mencion de la estraro de TEJO. Nun la vortoj de S-ro. Fariñas .

-- Kio estas HEJS ?

HEJS estas la Junulara Sekcio de Hispana Esperanto Federacio, sed, kvankam laŭstatule ni dependas de HEF ni estas, organize sendependaj kaj ni agas libere.

-- Kiajn rilatojn havas HEJS kun la enlanda Federacio ?

La rilatoj disvolviĝas amike. Dum la lasta Nacia Kongreso en Vigo estis novaj interkonsentoj, tamen, bedaŭrinde, la Federacio ne povas multe helpi nian laboron.

-- Kion celas HEJS ?

Du celojn havas nun HEJS: kunligi la junan hispanan esperantistaron kaj disvastigi Esperanton en junularaj medioj.

-- HEJS eldonas bultenon nur esperantlingve. Kial nur esperante ?.

Kiam ni prenis la taskon daùrigi la agadon de niaj katalunaj pioniroj ni multe pensis pri nia "Bulteno". Ĝis nun, nia plej efika ligilo estas ĝi,kaj se ni celas kunligi la hispanan esperantistan junularon, ni opiniis ke ni devis entrepreni tiun celon per la uzo kiel nura ligilo de la internacia lingvo Esperanto por ke ĉiuj el ni, praktike, utiligu ĝin, kaj ankaù por montri la taùgecon de Esperanto por solvi la lingvan problemon internacie.

-- Kion agas HEJS por la disvastigo de Esperanto inter la junularo ?

Malgraù niaj deziroj ni tre malmulte laboras en tiu kampo pro financoj, ĉar nia buĝeto estas tre malalta; tamen kelkaj gejunuloj gvidas kursojn kaj aliaj helpas en grupaj aktivecoj, ĉiam favore al Esperanto kvankam ne ĉiam rilatas nur la la junularo.

-- Kio estas TEJO ?

TEJO, estas la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. En nia landa estas HEJS kiu reprezentas tiun gravan internacian asocion.

-- Kiel vi kunlaboras kun TEJO ?

Post la translokiĝo de la sidejo de HEJS de Barcelona al Bilbao ni preskaù perdis la kontaktojn kun nia supera junulara organizo, sed laste, ni denove starigis tiujn kaj ni esperas ke ili fruktodonu baldaù en efika kunlaboro. Nia reprezentantino en la lastaj komitatkunsidoj dum la IJK okazinta en TORUN (Pollando) kontaktis kun diversaj estraranoj de TEJO por pli efika kunlaborado inter niaj organizoj, kaj ni atendas la rezulton de tiuj kontaktoj . Krome mi devas konstati ke mi persone kunlaboras kun la Lerneja Komisiono de TEJO. En tiu-ĉi jaro la estraro de HEJS starigis premiojn por tiuj kiuj varbas novajn membrojn. La premiojn konsistas el mono aù el libroj. Ankaù la "Bulteno" kreis konkurson por premii la plej bonajn esperantajn artikolojn, rakontojn,desegnojn ktp. Kondiĉoj pri ili aperas en la Nº 80ª. Ni kuraĝigas ĉiujn literaturemulojn .

Fine, ni atentas de la delegitaro la sendadon de informoj kaj ĉiuj sciigoj.

Al ĉiuj niaj amikoj, koran saluton.

JUAN AZCUENAGA

## HUMORA ANGULO

EN LA TABAKVENDEJO -

Infano eniras en tabakvendejon kaj petas :

- Mi deziras skatoleton da lignalumetoj.

Post momento, revenas la infano kaj diras :

- Mia patrino opinias ke viajn alumetojn estas neeble lumigi.

-Ha! -ekkrias la vendisto. Vi vidos tuj. Li prenas du alumetojn ,frotas ilin sur la glu - tean parton de sia korpo kaj tuj ekaperas la flamo.

Eliras la infano kaj post kvarono da horo li revenas kaj :

- Mia patrino diras ĉu vi bonvolos pruntedoni al ni vian pantalonon.

&$&$&$&$&$&$&$&$&$&$&$&$&

# La Virino La Pantalono kaj....

# Miaj amikoj

Estas nenia novaĵo anonci al vi la virinan kaj modernan modon, tio estas, la uzon de la pantalono ĉar mi estas certa, ke vi bone jam rimarkis ĝin.

Motive de tiu modo, ĉiu viro faras sian propran komentarion. Ofte la opinioj estas tre diversaj, favoraj, nefavoraj kaj malfavoraj pri la nova evoluiĝo de la virina vestado.

Hodiaŭ mia intenco estas prezenti al vi kelkajn opiniojn de amikoj miaj, kiujn mi konsideras iom originalaj kaj kiuj sendube helpos vin klarigi aŭ ordigi viajn privatajn pensojn pri la virino kaj sia pantalono . Jen :

<u>MI HAVAS AMIKON, KIU OPINIAS JENE:</u> Plaĉas al mi la nova modo, kial la virino ne rajtu uzi pantalonon?, ĉu ankaŭ en tiu tereno ekzistas diskriminacio por la virino? . Mi ne deziras aldonas mia amiko- analizi ĉu ŝi estas pli bela kun pantalono aŭ kun jupo, sed estas evidente, ke la nuna socio troviĝas en stadio en kiu la libereco devas esti gala por la viro kiel por la virino, en ĉiuj aspektoj de la vivo. Ĉu la virino ne kunlaboras en ĉiu faceto de la vivo, do, ŝi mem devas decidi pri siaj vestaĵoj. Kiuj estas ni viroj, por postuli al ŝi la uzadon de tiu aŭ alia vestaĵo.

<u>MI HAVAS ALIAN AMIKON, KIU OPINIAS JENE:</u> La virino devas uzi pantalonon, ĉar ŝi perdas intereson por la viroj. La pantalono estas vira vestaĵo, do, kiam mi vidas pantalonon mi tuj pensas al viro. Krome la leganteco de virino kun jupeto kaj tiu "kunlaboraĵo" de la malprudenta blovetado de la vento ne plu ekzistas kun la uzado de la pantalono. Ili ŝajnas viroj !! .

<u>MI HAVAS ALIAN AMIKON, KIU OPINIAS JENE:</u>

(Li estas poeto,almenaù tion li diras). Bonvolu legi:

Ho! virino, vi estas la ĉielo kaj la gloro,
Ho! belulino, vi estas kiel flaro el floro,
Ho! karulino, vestu vi jam ĵerzon el nilono,
sed ĉiam pli alloga vi estos kun....pantalono.

Ho! amatulino,kiam vian korpon sveltigas,
Ho! elegantulino, vi mian kapon turnigas,
Ho! ĉarmulino, vestu vi jam jupon el kotono,
sed ĉiam pli alloga vi estos kun....pantalono.

MI HAVAS ALIAN AMIKON;KIU OPINIAS JENE:

(Mi anticipe petas pardonon de vi, belaj kaj puraj virinoj pro la senhonteco de mia amiko). Legu kion li opinias : La pantalonon, ĉu vi scias ke oni utiligas tre ofte kiam la virino ne sentas emon sin lavi ?. (Mi opinias ke la aserto de mia amiko estas iom forta, tamen li ankoraù aldonas). Plaĉas al mi vidi virinojn kun pantalono ĉar tiamaniere ili evitas al mi vidi malbelajn krurojn. Finfine- li opinias - ke la virino devas uzi pantalonon kiam ŝi konsideras ĝin necesa por plibeligi sin kaj eviti al si laboron.

MI HAVAS ALIAN AMIKON,KIU OPINIAS JENE:

Estas evidente, ke la virino kun pantalono estas pli bela pli altira. Mi estas tutkore defendanto de la virino, kiu uzas pantalonon. Kiam ŝi marŝas, kia eleganteco!. Ŝiaj korpmovoj estas ritmaj. La virino, kiu scias elekti la ĝustan pantalonon evidentigas multe pli la virinan ĉarmecon, kaj nepre ĉiu viro devas ŝin admiri. La nova virina modo estas io, kio gajigas nian vivon, vigligas nian menson, konsekvence ili devigas al ni viroj, senti pli da estimo kaj amo por ili, niaj amataj turmentantinoj !! .

LUIS SERRANO PEREZ
( SABADELL )




49-jara sinjorino kun samaĝaj esperantistoj el la tuta mondo precipe japanaj.
Adreso :


Mª ENCARNACION JUANES
Alto de Somosierra,nº 3, 3º izqda.
BILBAO -12 - HISPANIO -

16-jara metiolernanto, radio-riparisto. Intereso pri fremdaj lingvoj, radio kaj fotoarto.
Jen la adreso :

S-ro. ALAN WILSON AVES
288 Hume Street
TOOWOOMBA - 4350
QUEENSLAND - AUSTRALIO

16-jara lernanto, intereso pri voĵaĝoj, muziko, amikeco .....
Jen la adreso:

S-ro. JEAN RIVAS
Avenue Audéoud
Le Léman II
F 83100 - TOULON - FRANCUJO



ANKAŬ DEZIRAS KORESPONDI .......

23-jara, inĝeniero, nun en soldat-servo.
Lia adreso estas :

S-ro. ENRIQUE FUEYO VEGA

Rto. Toledo 35
II- CIA. 1º Bon.

<u>ZAMORA</u>

Du junaj liceaninoj entusiasmaj esperantistinoj sopiras ricevi kontakton kun junaj hispanoj por interŝanĝi korespondaĵojn kaj amikiĝi.
Jen la adresoj :

F-ino. ANNA SEWERYN
Warszawa, 45
Ul./ Zeromskiego,
Nr 81, A, m.4

F-ino. EWA RADOMSKA
Warszawa, 45
Ul. Zeromskiego,
Nr 81, A, m.8

el Hungario.....

S-ro. LADISLAO HORNYÁK
3201 GYÖNGYÖS PF - 143

<u>HUNGARIO</u>

20-jara ĉeflernejano studento, kun samaĝa hispanino.